

Denis de Rougemont: *La sorto de la jaro 2000 estas decidata en niaj lernejoj*
artikolo el *Eŭropa Dokumentaro* de Eŭropa Centro de Kulturo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 558, 1974.06.19 & 22

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Denis de Rougemont, direktoro de *Eŭropa Centro de Kulturo* en Ĝenevo kaj profesoro ĉe la instituto **Institut universitaire d'études européennes**, ankaŭ en Ĝenevo, estas konata pro siaj verkoj, artikoloj kaj prelegoj favoraj al eŭropa federalismo.

A. En la numero 1-a de la nova revuo *Eŭropa Dokumentaro*, kiun ĝuste eldonas Eŭropa Centro de Kulturo, aperis 6-paĝa artikolo de Denis de Rougemont titolita *La sorto de la jaro 2000 estas decidata en niaj lernejoj*. Jen ni citas al vi fragmentojn el tiu teksto de Denis de Rougemont, kuraĝigante vin ĝin legi komplete en *Eŭropa Dokumentaro*. Ni citas :

Cl.- « Eŭropo en la jaro 2000 estos regata **aŭ de eŭropanoj**, kiuj nun aĝas inter 10 kaj 20 jaroj kaj kiuj estas nuntempe gelernantoj en niaj lernejoj, **aŭ de usona komisiono** (laŭ vizio de Valery), **aŭ de soveta komisaroj**, aŭ de la kombino de la lastaj du.

A.- Se Eŭropo estos regata de eŭropanoj, tio signifas, ke ĝi sukcesis unueciĝi. Alikaze, ĝi ne kapablos kontraŭstari la antaŭeniron de la du imperiismaj fortoj, la ekonomia kaj la ideologia.

Cl.- La bazo por tia unueciĝo, por ke ĝi estu sukcesa, devas esti tamen federismo, kaj estos sukcese nur se junaj eŭropanoj estas de nun edukataj en la mensa, psikologia kaj afekcia etoso, kiu implicate gvidos ilin al la direkto de tiu unuecigo kaj kiu faros tion ebla kaj necesa. Tamen, dum la lasta jarcento, lernejoj kreis precize kontraŭan specon de tia etoso. [...] Edukado [...] preparas naciistojn. [...] En la Lernejo la Nacio-Ŝtato estas prezentata laŭ la Napoleona modelo kiel centralizita, unuformeca, teritorie difinita estaĵo, kiel la fina solvo de la historio kaj la sola konceptebla formo por homa socio. [...] Tiu koncepto de Historio (kaj samtempe de la geografio, ekonomio, sociologio kaj civitaneco) ne nur estas malbona kaj kontraŭa al la plej evidentaj faktoj, sed ankaŭ faras neebla ian ajn supernacian aŭ federan unuiĝon en kontinenta skalo.

A.- Se ni deziras, ke Eŭropo en la jaro 2000 estos regata de eŭropanoj, aŭ, alivorte, se ni volas havi unuiĝintan Eŭropon, la Lernejo ne plu devas instrui al ni, ke la solaj realaĵoj estas Nacio-Ŝtatoj, ĉar tiuj estas principe kontraŭaj al ĉia ajn formo de serioza kaj efektiva unuiĝo, kontraste al la speco de unuiĝo menciata en ministraj paroladoj. [...] La konceptado pri la Nacio kaj ĝiaj mitoj devas esti forĵetita el la edukado, kaj ilin ni devas anstataŭigi per la Regiono kaj ĝiaj konkretaj realaĵoj, poste Eŭropo kaj ĝiaj kulturaj realaĵoj, kaj finfine la Homaro kiel biologia, ekologia kaj spirita unuo.

Cl.- Se ni ne komencas hodiaŭ kaj ne realigos dum la venontaj jaroj kompletan transformon de la instruado, Eŭropo en la jaro 2000 ne estos unuecigita. [...] Niaj Ŝtatoj hodiaŭ estas regataj de la lernolibroj, kiuj formis niajn ŝtatestrojn. » (Fino de la citaĵoj.)

A.- Denis de Rougemont donas ekzemplon pri la mito de Eŭropo, kiu etendiĝas de Ĝibraltaro ĝis Uralo, kaj kiu ankoraŭ influas ŝtatestrojn. Poste li raportas pri la laboro, kiun komencis efektiviĝi *Eŭropa Centro de Kulturo* por influi la lernejojn. Ni citas lin resume :

Cl.- « Ekde la jarto 1958 ni starigis al ni jenan demandon : kiel malfermi niajn Lernejojn al Eŭropo, por ke ili de nun preparu ne plu etajn naciistojn, pasivajn regatojn de senvizaĝa ŝtato kaj dentoradojn en meĥanizita socio, sed civitanojn, kiuj estas aktivaj kaj respondecaj pri siaj multoblaj sed konkretaj apartenoj al sia komunumo, al sia regiono, al nia Eŭropo kaj al la tuta Homaro ?

A.- En la printempo de 1961, ni decidis pri la gravaj linioj de programo tiel simpla kiel ambicio : **fari Eŭropon formante hodiaŭ la eŭropanojn de morgaŭ**. Ni montru niajn celojn jene :

Cl.- Eŭropo komenciĝas kun organizado ; Eŭropa Konsilio, Eŭropa Komunumaro, Eŭropa Organizaĵo por Nuklea Esplorado. Sed ĝi iĝos **vavanta** nur fare de la civitanoj, kiuj donas al ĝi spiron kaj kiuj estas konsciaj pri siaj devoj rilate al tiu granda ensemblo, kreanta liberojn, kiu konsistigas ilian civilizacion. [...]

A.- Jam de la komenco la ĉefa celo de la Kampanjo por Eŭrop-civitisma Edukado estis koncentrigi sian atenton sur la lernejojn kaj, anstataŭ plu aldoni studhorojn pri Eŭropo al programoj jam tro ŝarĝitaj, prefere provi – **kun la helpo de geinstruistoj** – enkonduki eŭropan vizion en la lecionoj pri historio, geografio, ekonomio, lingvoj, artoj kaj civitismo. [...] (Fino de la citaĵoj.)

Cl.- Denis de Rougemont poste raportas, kiel miloj da gesinstruistoj partoprenis trejn-periodojn aŭ staĝojn por sin formi al tiu nova orientado, kaj kiel tio jam atingis multege da gelernantoj. Sed tio nature nur estas komenco.

A.- Povu esperanto-instruistoj interesiĝi al tiu agado kaj ĝin partopreni. Ni legis al vi fragmentojn el la unua numero de la revuo *Eŭropa Dokumentaro*. Vi havigu al vi la duan numeron de tiu kvaronjara revuo, kiun eldonas *Eŭropa Centro de Kulturo*. Radio Svislando pretas peradi vian informpeton.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!